La Hodiaŭa Ĵurnalo
2017-12-21 n-ro 392

# Filozofio kontraŭ tribismo



Sekureca Konsilio de UN renovigis rajtigon pri translandlima humanitara helpo al Sirio

Aŭstrio: Manifestacio kontraŭ la reveno de ekstremdekstro ĉe la koalicia registaro

78 homoj mortigitaj en konflikto inter etnaj komunumoj en Etiopio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Sekureca Konsilio de UN renovigis rajtigon pri translandlima humanitara helpo al Sirio
*Por plia periodo de 12 monatoj ĝis la 10-a de januaro 2019 p. 03*

78 homoj mortigitaj en konflikto inter etnaj komunumoj en Etiopio
*Konflikto inter oroma kaj somalia komunumoj p. 03*

Aŭstrio: Manifestacio kontraŭ la reveno de ekstremdekstro ĉe la koalicia registaro
*«Kabineto de la hororoj» p. 04*

Rumanio: la juĝistoj mobiliziĝas kontraŭ la reformo de la justico
*Timo de la juĝistoj pro redukto de ilia sendependeco p. 04*

Honduro: streĉitecaj manifestacioj post la reelekto de la prezidento
*Venko de la konservativa prezidento Juan Orlando HERNANDEZ dum kontestata baloto p. 05*

Junaj miliarduloj – fratoj havas rangojn unuan kaj trian tutmonde
*Po 1,1 miliardoj da usonaj dolaroj p. 06*

Nur du manĝoj tage kontraŭ obezeco
*Efike favoras maldikiĝon p. 06*

Brazilano en la franca Akademio de Arto
*Sebastião SALGADO p. 07*

Filozofio kontraŭ tribismo
*Krizo de la ideo pri humaneco p. 08*

Hodiaŭe
*Heinrich BÖLL; Jan Václav NOVÁK; Tomasz ZAN; kaj Poliodono p. 10*

## Sekureca Konsilio de UN renovigis rajtigon pri translandlima humanitara helpo al Sirio

La Sekureca Konsilio de UN marde [19 dec 2017] adoptis rezolucion por renovigi rajtigon pri translandima kaj translinia humanitara helpo al Sirio por plia periodo de 12 monatoj ĝis la 10-a de januaro 2019.



Rezolucio 2393 estis adoptita per 12 poraj voĉoj kaj tri sindetenoj de Bolivio, Ĉinio kaj Rusio.

Ĝi petas, ke la Siriaj aŭtoritatoj rapide respondu ĉiujn petojn por transliniaj liveroj prezentitaj de UN kaj iliaj efektivigaj partneroj kaj pozitive konsideru tiajn petojn.

La rezolucio, kiu estis skizita de Egiptio, Japanio kaj Svedio, asertas, ke la situacio en Sirio malboniĝos plu pro manko de politika solvo, kaj urĝas penojn por faciligi politikan transiron de Sirio.

La rezolucio petas Ĝeneralan Sekretarion de UN António GUTERRES fari, ene de ses monatoj post la adopto de la rezolucio, sendependan skriban recenzon pri la humanitaraj translandlimaj agadoj de UN, inkluzive de rekomendoj pri plifortigo de la kontrolado de la UN.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## 78 homoj mortigitaj en konflikto inter etnaj komunumoj en Etiopio

Etiopa oficialulo diris marde [19 dec 2017], ke 78 homoj estis mortigitaj lastatempe en konflikto inter oroma kaj somalia komunumoj.



La konflikto okazis la 14-an de decembro en la regiono *Okcident-Hararghe*, kiam homoj de la oroma etnogrupo estis atakitaj sur la revena vojo post la akiro de helpa manĝaĵo, kaj 29 homoj estis mortigitaj. Estis informo, ke la atakantoj eble venas de vilaĝo loĝata de somalianoj en la regiono *Okcident-Hararghe*. Poste la oroma etnogrupo reagis por venĝi la viktimojn, kaj 49 homoj estis mortigitaj en la batalo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Aŭstrio: Manifestacio kontraŭ la reveno de ekstremdekstro ĉe la koalicia registaro

Pluraj miloj da personoj manifestaciis en Vieno por protesti kontraŭ la nomumo, ĉi-lundon [18 dec 2017] matene, de registaro kromnomata «kabineto de la hororoj» pro la ĉeesto de ekstremdekstro.




«Nazioj for», «Morton al faŝismo» - jen kion ni povis legi sur la afiŝtabuloj de miloj da manifestaciantoj. La politiko, kiu de nun estos kondukita en ilia lando vere maltrankviligas tiujn aŭstrianojn.

«La normaligo de ekstemdekstro estas unu afero. La alia problemo estas, ke ni perdos socialajn rajtojn, kiujn ni akiris per drastaj bataloj. Estontece, la batalo estos eĉ pli malfacila. Solidareco en nia socio malkreskas. La homoj interluktas unuj kontraŭ la aliaj. Ne plu temas nur pri fremduloj kontraŭ landanoj, sed ankaŭ malriĉuloj kontraŭ riĉuloj», eksplikas manifestaciantino.

«Mi opinias, ke Aŭstrio devus restadi malferma. Tutevidente, ni estas malgranda lando, kaj ne povas akcepti ĉiujn, sed ni devas eviti vidi suspektatojn ĉie, kaj esti tute malamikaj al migrado kaj rifuĝintoj», aldonas Fam FISKAL, porparolanto de NRO.

La manifestaciantoj estis enkadrigitaj fare de multegaj policistoj, kiuj kanaligis la kolektiĝon sur la Heldenplatz-placo, simbola loko de la aŭstria historio, kie HITLERO diskursis en 1938, por proklami la anekson de Aŭstrio al Germanio.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Rumanio: la juĝistoj mobiliziĝas kontraŭ la reformo de la justico

La rumanaj juĝistoj kuniĝis kun la movado, kiu protestas kontraŭ la reformo de la justico kaj de la punkodo, iniciatita de la registaro.




Nun ekzamenata de la Senato, tiuj leĝprojektoj estigas timon de la juĝistoj pro redukto de ilia sendependeco kaj striktigon de la prerogativoj de la kontraŭ-korupta prokurorejo.

Ĉar ili ne rajtas manifestacii, ili silente kolektiĝis.

«Ni estas ĉi tie por defendi la intereson de la popolo. Ni plenumas niajn ĉiutagajn misiojn, sed ni deziras labori kiel antaŭe, asertas Antonia DIACONU, kiu laboras en la kontraŭ-korupta prokurorejo».

La leĝprojektoj estis jam adoptitaj de la deputitoj, kvankam la Supera Konsilio de la juĝistaro publikigis negativan opinion.

De pluraj semajnoj, miloj da personoj manifestacias ĉiudimanĉe en Rumanio kontraŭ tiu juĝa reformo, ankaŭ kritikata de Bruselo kaj Vaŝingtono.

Neniam Milito Inter Ni

# Honduro: streĉitecaj manifestacioj post la reelekto de la prezidento

Lundon [18 dec 2017] la policistoj uzadis larmigajn gasojn por disigi manifestaciantojn, kiuj incendiis barikadojn post la oficiala anonco pri venko de la konservativa prezidento Juan Orlando HERNANDEZ dum kontestata baloto.




De post la baloto de la 26-a de novembro, la defendantoj de la maldekstra kandidato Salvador NASRALLA manifestacias por kondoamni supozitan «fraŭdon» dum tiu baloto, makulita per malregulaĵoj, laŭ la opozicio kaj parto de la internaciaj observantoj.

Dimanĉon [20 dec 2017], la balotaŭtoritatoj oficiale deklaris kiel venkinton S° HERNANDEZ, 49-jaran. Tiu rezulto estis tuj kontestata de la kontraŭa kampo, kiu alvokis siajn defendantojn surstratiĝi.

La protestoj vigle komenciĝis dimanĉon vespere, per konstruado de barikadoj en pluraj vojoj tra tiu lando de Sud-Ameriko, ronĝita de krimaj bandaĉoj, kaj daŭris malfrue en la nokto.

En la ĉefurbo Tegucigalpo, la loĝantoj vekiĝis lundon antaŭ ŝtonamasoj, pneŭaj radoj kaj aliaj fumantaj rompitaĵoj, kiuj obstrukcis la stratojn. La policistoj devis uzadi levmaŝinojn por malembarasi ilin. Meze de la tago, sub pluveto, malgrandaj grupoj de manifestaciantoj plu prizorgis kelkajn blokadojn.

Ĉe la norda elirejo de la urbo, la polico pafis larmigajn gasojn por disigi la manifestaciantojn.

Norde de la lando, en *San Pedro Sula*, la polico raportis pri rabado de pluraj magazenoj kaj incendio de bankagentejo kaj buso.

«Ili ne solvos la problemon mortigante nin kaj pafante larmigajn gasojn», deklaris la eks-ŝtatestro Manuel ZELAYA, ĉekape de la maldekstra alianco, kiu opozicias al HERNANDEZ, en la televidkanalo *UneTV*.

Dum tiu tempo, S° NASRALLA, 64-jara, parolisto ĉe televido kaj politike sensperta, estis lundon [18 dec 2017] en Vaŝingtono, kie li renkontis la ĝeneralan sekretarion de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ), Luis ALMAGRO, kaj estas akceptota ĉe la Usona ministrejo por eksterlandaj aferoj.

«Ni prezentis multegajn pruvojn, ĉar tiu balotŝtelado enhavas plurajn aspektojn», li deklaris post tiu kunsido.

La venkinta prezidento HERNANDEZ baziĝas sur kontestita decido de la Konstitucia tribunalo, por prezentiĝi al dua mandato, kion malpermesas la Konstitucio.

Raporto de Amnestio Internacia, publikigita en Meksiko asertas, ke almenaŭ 14 personoj mortis dum la manifestacioj. La honduraj aŭtoritatoj konfirmis nur tri mortintojn, dum S° NASRALLA mencias siaflanke 20 mortintojn.

Neniam Milito Inter Ni

## Junaj miliarduloj – fratoj havas rangojn unuan kaj trian tutmonde



John Collison estas 27-jaraĝa irlandano kaj li estas la plej juna miliardulo de la mondo, se oni konsideras nur tiuj kiuj "konstruis" siajn riĉaĵojn, ekzemple sen heredaĵoj. Lia plej aĝa frato Patrick Collison (29-jaraĝa) okupas la trian pozicion – la dua apartenas al Evan Spiegel (27-jaraĝa), kiu estas kunfondinto de la socia retejo Snapchat.

Rezignintaj pri universitata diplomiĝo, ili fondis en la jaro 2011 ĉe "Silicia Valo" (Kalifornio – Usono) la firmaon *"Stripe"*, kiu vendas komputilajn programojn por glatigi retpagojn al firmaoj kaj retvendejoj tutmonde.

Tiuj fratoj plenkreskis en kampara vilaĝo okcidente de Irlando, nome *Country Tipperary*. En 2007 Patrick eklernis matematikon en la fama usona universitato "*Massachusetts Institute of Technology* (MIT)", kaj post du jaroj John estis akceptita de la usona universitato Harvardo.

Sed eĉ antaŭ la komenco de studado ili iĝis milionuloj pro la unua entreprenado de tiu duopo, nome la firmao *"Auctomatic"*, kiu en 2008 estis vendita kontraŭ 5 milionoj da usonaj dolaroj. Ĝi estis produktanta programojn kiuj utilas al konsumantoj kaj firmaoj je negocado kadre de la retvendejo *"eBay"*.

Laŭ la revuo *"Forbes"* ĉiu el tiuj fratoj havas riĉaĵon taksatan je 1,1 miliardoj da usonaj dolaroj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---

## Nur du manĝoj tage kontraŭ obezeco



La konsumado de nur du manĝoj tage, inkluzive matenmanĝon efike favoras maldikiĝon, en pli signifa grado ol pli ofta konsumado de malpli grandaj porcioj. Sciencistoj el *Loma Linda University School of Public Health* el Kalifornio kunlabore kun ĉeĥaj sciencistoj analizis donitaĵojn de pli ol 50 660 plenkreskuloj en la aĝo de 30 kaj pli da jaroj.

Ili partoprenis la esplorojn *Adventist Health Study-2*, kiuj ĉirkaŭprenis adventistojn el Usono kaj Kanado, kiuj kalkuliĝas ĝenerale al la tn. sana populacio. La esploroj – daŭrantaj 7-8 jarojn – koncentriĝis pri la kvanto da manĝoj tage, dormokvanto nokte sen manĝo, konsumado de matenmanĝo kaj horo de la plej ampleksa manĝo. En la analizo estis konsideritaj demografiaj faktoroj kaj tiuj, kiuj ligiĝis kun la vivstilo povantaj influi la esplorrezultojn.

Estis konstatite, ke kvar faktoroj favoris malkreskon de la pezo: la konsumado de nur du manĝoj tage, rezigno pri manĝo dumnokte almenaŭ 18 horojn post la lasta manĝo, konsumado de matenmanĝo kaj elekto de plej ampleksa manĝo por mateno aŭ por tagmanĝo. La dikiĝadon favoris la konsumado de pli ol tri manĝoj tage, la intermanĝoj estis konsideritaj kiel apartaj manĝoj) kaj konsumado de la plej ampleksa manĝo vespere. Ĉio ĉi konfirmas la pravecon de malnova maksimo, ke per matenmanĝo oni regalu sin kiel reĝo, per tagmanĝo kiel princo, sed vespere oni manĝu kiel povrulo.

Pola Retradio

# Brazilano en la franca Akademio de Arto

La 6-an de decembro 2017, unuafoje enposteniĝis brazilano en la Akademio de Belarto, en Parizo. La eminentulo estas la mondkonata Sebastião SALGADO. Li estas fotografiisto, kiu de jardekoj sin dediĉas al registrado de sociaj fenomenoj tra la tuta mondo.



Tiu tradicia institucio estis fondita en la 17-a jarcento kaj estas unu el la kvin akademioj, kiuj konsistigas la Francan Instituton – templon de plej gravaj produktaĵoj en arto kaj scienco. Ĝi enhavas sekcion pri Fotografio, kun kvar okupantoj. Unu el ili estis vaka ekde la jaro 2014, post la morto de Lucien CLERGUE. En 2016, SALGADO estis elektita.

La franca prezidento Emmanuel MACRON ne ĉeestis sed sendis salutmesaĝon. Kolego de la brazilano en la akademio paroladis pri la vivo kaj verko de la nova akademiano. Elegante vestita per orbrodita frako, la brazilano ploris, kiam oni menciis liajn filojn kaj la edzinon Lélia.

La geedzoj alvenis en Parizo en la jaro 1969, ekzilitaj el la militista diktatora reĝimo tiam reganta en Brazilo: tiutempe, SALGADO estis ekonomiisto kaj aktiva maldekstrulo. Li tute ne interesiĝis pri fotografia arto. Poste, ili migris al Londono. Dum vojaĝo en Afriko, li komencis fotografi hobie, per fotilo pruntedonita de sia edzino. Ĉi tio tuj fariĝis pasio. Li ĉion flankenlasis por sin dediĉi ekskluzive al fotografio. Pro sia eksterordinara talento, li laboris por la plej gravaj foto-agentejoj kaj fariĝis internacie konata. De pluraj jaroj lia persona studio situas en la ŝika adreso *Avenuo Champs Élysées*, en la franca ĉefurbo. Dum la lastaj jaroj, li okupiĝas pri ekologia agado. En Brazilo, li jam organizis plantadon de milionoj da arboj por restarigo de tropika arbaro.

Sebastião SALGADO publikigis plurajn librojn de fotoj faritaj dum siaj multaj vojaĝoj tra la mondo. Unu el la plej belaj kaj impresaj estas “Genezo”, en kiu li montris fotojn faritajn en lokoj neniam antaŭe vizititaj de homoj.

En la komenco de sia kariero, li dokumentis terurajn scenojn de homa suferado kaj malsatmortado en Afriko. Tiu sperto estis tiel ŝoka, ke ĝi kaŭzis mensan skuon al la artisto. Ĝi estis angora tempo en lia vivo. Laŭ lia deklaro, lin savis de tiu krizo la edzino Lélia, kiu ame apogis lin.

Pro tio li dediĉis al ŝi la muzikprezenton (vidu), kiu fermis la ceremonion en la Akademio de Belarto, en Parizo. Sebastião SALGADO ne estas nur artisto. Li estas plena humanisto, kiu konstante pledas por egaleco, justeco kaj respekto al ĉiu homo sur nia mondo.

Paŭlo Sergio VIANA
Esperanta Retradio

# Filozofio kontraŭ tribismo

La "migra krizo" indikas tribajn enmemiĝojn de kiuj fontis, kion la filozofo Souleymane BACHIR nomas la "krizo de la ideo pri humaneco". Jen filozofia irado tra aktualaĵo laŭ la Bergsona penso.



Ni konstatas nune krizon pri la humaneca ideo, pri kiu filozofio povas kaj devas helpi nin pripensi tion. Krizo de la humaneca ideo: kion tio signifas? En la franca ĵurnalo *Le Monde*, la 30-an de aprilo 2017, Nicolas HULOT, kiu tiutempe estis ne la ministro kiu li estas nun, sed la prezidanto de la Fondaĵo por "naturo kaj homo", faris ĉi tiun demandon: "Pri la migrantoj, kien foriris nia homamo?"

Mi konsideras nepre grava la manieron de la demando, ĉar ĝi montras ke tio, kion evidentigas la migrokrizo kiun ni travivas – kaj pri kio oni diras, ke ĝi estas sen antaŭaĵo ekde la Dua Mondmilito – estas la konigilo de la identecaj enmemiĝoj, kiuj nun kontraŭas la reguligan, etikan ideon de humaneco.

Necesas kune konsideri la figuron de migranto, kiu pensigas nin pri la homa angorego kaj la kresko de etnonaciismoj, kiel ofte dirite, kaj kiujn mi nomas tribismoj, konsiderante ke la priuzata vorto populismoj ne sufiĉas por priskribi ilin.

La plej bona simbolo de tiu renkonto inter migranto kaj etnonaciisto estas tiu ŝipo, kiun ŝipluprenis junaj eŭropaj ekstremdekstremuloj, memnomataj "identeca generacio", por bari la vojon en Mediteranea maro al la boatoj de migrantoj. Oni sin demandas, ĉu ili volas dronigi ilin. Alia bildo estas tiu de fiŝkaptistoj de Tunizio oponantaj al la eblo ke tio, kion ili konsideras "rasisma ŝipo", povu provizi per benzino la havenojn de ilia lando.

Oni scias, ke tie aŭ aliloke la etnonaciismaj movadoj enkondukis al regado partiojn kaj homojn, kiuj faris de migranto timigaĵon kontraŭ kiu ili petis siajn voĉdonantojn varbiĝi, fari nacian alfronton. Ili preskaŭ sukcesis ke ilia ideologio iĝis la unua en lando, Nederlando, kiun la historio, speciale tiu de filozofio, konsideras kiel terenon de toleremo kaj de humaneco.

**La primitiva karaktero de la triba instinkto**

Sin demandi, kio donas al tribismo ĝian povon, postulas analizon al kiu filozofio, speciale tiu de Henri BERGSON (1859 – 1941), donas la plej valoran klarigon. Ĝi instruas al ni, ke la rekta rifuzo aŭdi la demandon de Nicolas HULOT trovas sian fonton en la neado de la ideo de "humaneco ĝenerale" ekde kiu povas stariĝi la devigo de gastamo.

Ĉu ne ekzistas homamo ĝenerale? Ĝi ekzistas por tio, kion BERGSON nomas "la malfermiĝanta animo" aŭ ankoraŭ "la malferma animo", kaj tio estas en la kerno de ĝia penso en *La du fontoj de la moralo kaj la religio* (Parizo, 1932).

En tiu verko la franca filozofo klarigas, ke en ni la sento pri nia aparteno al la tribo estas instinkto. Nu, ĉar temas pri instinkto, ne bezonatas sin demandi pri ĝia deveno aŭ pri ĝia naturo, sed nur rekoni, ke ĝi ekzistas kaj ke ĝi estas primitive registrita en nia naturo.

Jen do la vigligilo sur kiu fondiĝas tribopolitiko, la alvoko al etnonaciisma varbiĝo. Oni do

komprenas ke, kiam tiu politiko alprenas aspekton de natura saĝo, sin prezentas kiel tuja evidento kontraŭ la komplikaĵoj de tio kion ĝi kondamnas kiel ion "politike taŭgan" pri malfermo al aliuloj, estas la primitiva karaktero de la triba instinkto de kiu ĝi faras fundamentan veron. Kio ekzistas por mi, estas la proksimeca rondo de gehomoj, kiuj similas al mi, kiuj havas saman haŭtokoloron aŭ saman religion ktp. Tiel okazis eĉ propono elekti la azilpetantojn depende de ilia religio!

Se oni volas elvoki abstraktaĵon kiel tiun de homamo, tio povos nur esti zoologia sumigado, aro nur rezultanta de aldono de devige diverskonsistaj homamoj. Tutsimple ne eblas atingi la humanecan ideon komencante per la apartenoj kaj kreskigante iompostiome la teritoriajn apartenojn. Mallongavorte oni ne povas grandigi la triban instinkton por fari el ĝi homaman instinkton.

**Trans la instinkto, jen la malfermo**

Do necesas eliri el la instinkto, por sin trovi en kontakto kun homamo en si mem kaj en la aliaj. Tiam la demando iĝas: kiel eblas malfermi la animon transe de la tribo, se esence ni amas "nature kaj rekte niajn parencojn kaj niajn kunvivantojn, dum la emo al homamo povas nur esti malrekta kaj akirita", laŭ citaĵo de Bergson. De kiu fonto, kiu ne havas la tujecon de instinkto, tio povus eltiri forton? Alidire, kiel eblas akiri tion, kio kontraŭas la naturan planon por nin estigi en la vivloko konstruita de nia "tribo", kun ĝia propra moralo kaj ĝia opono al aliaj triboj? Tio eblas, klarigas Bergson, ĉar en nia naturo estas ankaŭ povo "erarigi" tiun naturon mem kaj, graŭ [danke al] la saĝo, grandigi "la socian solidarecon ĝis homa frateco".


Oni do akiras la sencon de tiu homa frateco iuflanke tra la religio (prie necesas memori, ke vortdevene unu senco de tiu vorto estas, kio kunligas aŭ religas) kaj aliflanke tra la saĝo, sub formo de filozofia inteligento. Do, por sin malfermi ekster la instinkto, estas alvoko de la religio por ami la homaron "tra Dio, en Dio", kaj la saĝo "per kiu ni ĉiuj komuniĝas" kaj per kiu "la filozofoj rigardigas al ni la homaron por montri al ni la eminentan indecon de la homa persono, la rajton de ĉiuj por esti respektata".

Tiu homamo ne estas primitiva kiel male la instinkto. Tamen ĝi estas fundamenta. Ni spertas ĝin tra egala amo al Dio kaj al proksimulo kiel al si mem aŭ tra la filozofia penso: ĉiuflanke Bergson diras, ke ni atingas tion per unu salto kaj ne per sinsekvaj etapoj, kiuj estus la familio, poste la nacio, ktp. La "migra krizo" kiun ni spertas estas nia propra identeca enmemiĝo, kiu ŝancelas la reguligan kaj etikan ideon pri humaneco.

"La malferma animo" estas precize la principo de tiu salto. Ĝi estas la malo de malkreska, fermita animo, por kiu ami estas ami kontraŭ, kiu pri la ideo de humaneco respondas, ke ĝi zorgas sin mem kaj pri kio plej proksime tuŝas ĝin, ke tio estas sufiĉa, ke ĝi jam havas sufiĉe por fari, ke ĝi ne povas gastigi la mizeron de la tutmondo.

Kontraŭ tiu miskreska animo kaj ĝiaj malveraj evidentoj, mi rekonas min malfermata animo, kiu ĉeestigas al mi – ĝis palpebleco – la homamon, kaj kiu faras, ke mi povas esti la proksimulo de iu, kiu ne estas de mi parenca ulo. Kiel skribas Bergson, mi rekonas per tio mem, ke ĉiam ni devas iĝi humanaj, tio signifas ke tiun malfermatan animon ni devas daŭre grandigi en ni kaj fondi sur ĝi pri la migra krizo respondon, kiu estu homamo kaj gastigado.

Souleymane Bachir Diagne
Tradukis Pjer Tell Bouvier
Unesko-Kuriero 2017, n-ro 3



## Heinrich Böll

**Heinrich Theodor Böll [HAJNriĥ Bel] (naskiĝis la 21-an de decembro 1917, mortis la 16-an de julio 1985) estis germana verkisto. Li gajnis la Premion Georg Büchner en 1967 kaj la Nobel-premion pri literaturo en 1972.**

**En Esperanto aperis: *La perdita honoro de iu Katarino Blum; Al la gepatroj de ĉiuj tempoj; En la lando de la rujukoj; Okazis io*.**

**Vikipedio**

## Jan Václav Novák




**Jan Václav Novák (naskiĝis la 21-an de decembro 1853 en *Račice u Smiřic* - mortis la 30-an de aprilo 1920 en Prago) estis mezlerneja instruisto, doktoro pri filozofio, literatura historiisto, komeniologo, tradukisto.**

**En Esperanto aperis: *Jan Amos Komenský*.**

**Vikipedio**



## Tomasz Zan

**Tomasz Zan - (pole- Tomasz Zan, beloruse - Тамаш Зан 21-an de decembro 1796, vilaĝo *Mjasata*, apud *Aŝmjani* - 19-an de julio 1855, bieno *Kaĥaĉin* apud *Orŝa*). Pola verkisto, ludis gravan rolon en evoluo de nova literatura tendenco - revolucia romantikismo.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Poliodono (*Polyodon spathula*).**

**Vikipedio**